

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto Association.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio)

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-roj 18-19. Melburno (*Melbourne*), Aŭstralio. 10 Januaro, 1922.

British Association for the Advancement of Science approves of International Language.

The sub-committee of the British Association appointed to inquire into the practicability of an international language presented its report in September. The conclusions arrived at are (1) That Latin is too difficult to serve the purpose; (2) that the adoption of any national language would confer undue advantages and excite jealousy; (3) that, therefore, an "invented" language is the best. The sub-committee considers Esperanto to be suitable for the purpose.

A Professor's Test.

Professor J. J. Findlay has conducted an experiment with a class of secondary-school teachers at Manchester University, and his conclusions are as follows:—(a) A practical knowledge of Esperanto can be acquired in a far shorter time than any natural speech, ancient or modern; three weeks of intensive study under a good instructor would enable a class of teachers to master the essentials and acquire a fluency which is seldom gained in French or German after twelve months' study abroad. (b) Its construction secures the intellectual interest of the learner, and invites him to go forward and complete the mastery.

Staff at League of Nations forms Esperanto Group.

It is an indication of the progress of Esperanto that a group for the study and propaganda of the language has been formed among those attached to the secretariat of the League of Nations. The members are attached to the staffs of various delegates to the League. The group meets monthly, and also publishes its own journal, "Nova Tagiĝo"—The New Dawn. As this is the staff that is working on the preparation of a report regarding the introduction of Esperanto into state primary schools throughout the world, it is gratifying to know that some of the members are in close touch with the subject of their inquiry.

Fremdula Legio.

En la fremdula legio en Maroka lando fondiĝis esp. grupo de diversnaciaj soldatoj dank' al la klopodoj de nia rusa samideano kaporalo Vasilieff. Diverslandaj samideanoj bonvolu sendi diverslingvajn lernokaj legolibrojn laŭ la adreso de la sekretario sro. Vegoff, n-o 11671, 4-e Regiment Etranger, 1-e Bataillon, 3-e Compagnie, Beni-Mellal (Maroka lando).

Here and There.

Several eminent Japanese now at Geneva in connection with the League of Nations have become impressed with the importance of Esperanto, and have decided to forward a petition to the Japanese Parliament asking that body to give the subject serious and thorough consideration.

Students who attended the Prague congress passed the following resolution:—The Esperanto students, meeting at Prague, recommend to the International Federation of Students the use of Esperanto in its meetings and for its official journal. The students expect the Federation to help the Esperanto movement by every means in its power. A committee was elected to prepare for the formation of an Esperanto Student League during the congress at Helsingfors.

The United Kingdom Commercial Travellers' Association at their 28th annual conference held at Chester advised manufacturers for export to use Esperanto in their foreign correspondence.

The Senate of Danzig has provided an office and attendant for the Danzig Esperanto Office. It looks as if this little State is going to be the first to officially recognise Esperanto.

In Werdau, (Saxony), and in Leipzig, Esperanto is an optional subject in the elementary schools. In the first named place 150 children are studying it voluntarily, and at Leipzig 60 teachers are qualified to teach. More than 200 children are learning Esperanto in the Dresden schools, and 120 at Wismar.

The Hague Tramway association gives 25 guilders to each employe who passes an examination in Esperanto.

In Targuk-Mures 300 persons have learnt Esperanto. Among those speaking it perfectly are professors, lawyers, business men and workmen.

Of the 200 residents in the village of Borgestena, Sweden, fifty are Esperantists.

The Labor League of the State of Ceara, Brazil, has decided to use Esperanto in its international correspondence, and has urged all its members to learn the language.

Delsudo—al Nordo!

Nia ŝipo, ne tre granda, ne firma, sin jetis tien kaj reen sur la ondanta maro, kun malcerta irado ebriulo. Blovis persista vento, en la skriboĉambro, legoĉambro, biblioteko, koncerta salono, babilakceptejo, vestiblo (la malvarma spaco ĉe la supro de la ŝtuparo havis diversajn egale netaŭgajn nomojn) oni plendis pri trablovo.

Kaj ni estis en tropika regiono. Morgaŭ ni devis esti en Port Moresby, ĉefurbo de la tropika kolonio Papuaj Nov-Gineo. Anstataŭ brulanta suno, lazura maro el vitro, kara zefiro... ni ekkriis — Fermu la pordon! Ni mortas de malvarmo.

Sed morgaŭ venis kaj Port Moresby kaj varmego. Vasta haveno ĉirkaŭata de montetoj malhelverdaj, dense kovritaj de arboj. Ekluko, kie la montetoj perdas sin verdon kaj montras nudan, krudan grundon, rigide reflektantan la varmemon, tie staras la urbeto — centoj da domoj starantaj malproksime unu de la alia apud krutaj stratetoj, kun vastaj verandoj kaj blankaj latisoj.

Ĝi ne estis tre alloga. Ĝi frapante malsimilis al milo da similgrandaj urbetoj en Aŭstralio. Serierigardante la havenon, oni vidis malproksimo ion strangan, novan, interesan. Indigena vilaĝo. Ĉe la bordo mem, eĉ super la akvo sur altaj fostoĵoj, staris longa vico da dometoj el malhela flava pajaĵo. Nepre ni vizitos tion...

Sur la ŝipstacion dume venis dudeko da blanke vestitaj homoj kaj ducento da brune nevestitaj homoj. La blanke vestitoj staris kun digna mieno kaj iom rigida sinteno, atendante la alvenon de la ŝipo, ililigilo kun la granda mondo. La brune nevestitoj sidis, kuŝis, kaŝis, kuris, disputis, marĉandis, babilis, kantis, malpacis, atendante kun duonintereso la alvenon de la ŝipo.

Kanotoj, kun paralela trabo fiksitaj pro ekvilibro je unu, ĝis du-metro distanco, venis al la ŝipo, portante bananojn por vendo. Brunuloj vestitaj nur per helkolora lumbotuko kun vaste frizita, krispa hararo, kun larĝa vizaĝo kaj malalta staturo proponis la fruktojn kaj ensaltis en la akvon, pro ĵetitaj moneroj. La ŝipo albordigis, kaj oni povis jam iri sur

firma tero post tuta semajno da vivo sur maro.

La varma suno brulis, reflektate de la nuda grundo, precipe por tiuj Sudanoj, kiuj ankoraŭ ne akiris la blankajn vestojn de la tropiklando. Duonhora vagado baldaŭ elĉerpis ĉiujn allogojn de la urbeto. Estis dimanĉo, kaj krom la ŝipo la sola centro de vivo estis la poŝtoŝejejo, kie la logantoj kolektis siajn leterojn kaj distrite staris legante ilin, malatenta je ĉio ĉirkaŭ si. Oni enuis.

Sub la influo de varmo, ŝvito, laco, eĉ la norda poluso baldaŭ perdus sian ĉarmojn. Ĉu piediri al la indiĝena vilaĝo? Tro longe, tro varme, tro lacige, tro... neeble. Kial oni ne havas fiakrojn, riksa-ojn, ian publikan veturilon? Oni sidas sur benko antaŭ la poŝtoŝejejo kaj rigardas la indiĝenojn.

La ĉefa impresio pri la indiĝenoj de Nov-Gineo estas bruneco. La koloroj varias de pala ĉokolada ĝis preskaŭ nigra. La ambicio de sinjoro Delsudo vidi tute nigran, karbe nigran homan estaĵon ankoraŭ ne plenumiĝis. La loganto de Buka, ĉe nordo de insulo Bougainville estas tre nigraj, sed ne sufiĉe por kontentigi tiun sopiron. Kaj aliaj estas tiel palaj, kiel ĉinoj. Sed ĉiam ili estas brunaj.

La brunecon tamen iom varias la naturo kaj la arto. La okulblanko foje estas fantome blanka, kaj foje la okulblanko estas vere... okulbruno. La manplatoj kaj la plandoj estas ĉiam tre palaj kaj donas kuriozan impreson pri granda diligento, kvazaŭ per longa laborado oni foruzis la brunan koloraĵon; impresio, kiu estas tute ne prava! Krom la heleco de la lumbotuko ili koloras la vizaĝon en plej stranga, nehoma maniero. Rapida surŝmiro de blankaĵo donas aspekton de fantomo. Diagonala heleruĝa strio, de unu busangulo ĝis la aliflanka templo, donas aspekton simple diablajn; kaj hele, verda demanda signo sur la tuta vizaĝo, kiujn mi unu fojon vidis donis aspekton vere... virinan. Nur hodiaŭ mi vokis mian "knabon" (maldika, skeptika, ironia junulo, kiu plenumas miajn bezonojn fidele kaj akurate, sed kvazaŭ tolerante la kapricojn de bonkora maniulo) kaj liaj akraj okuloj rigardis el la centroj de du makuloj hele bluaj. (Mi devas parenteze klarigi, ke ĉiu vira indiĝeno, ĉu juna knabo, plenaĝa

viro, aŭ maljunulo, estas nomata "knabo," kaj same, virina indiĝeno estas nomata "mario").

Ne per indiĝenoj sole vivas la homo — despli se li ne estas kani-balo! — kaj malsato revokis al la ŝipo. La afabla kapitano aranĝis por favorata grupo de pasaĝeroj ekskurson al la indiĝena vilaĝo, kaj sinjoro Delsudo estis unu el la favoratoj. Motorsipeto portis nin unue al la eniro de Fairfax-haveno, la vasta dua haveno de Port Moresby, kaj poste ĉirkaŭ bela insuleto al la vilaĝo mem. Aro da knabetoj alkuris por helpi la albordiĝon kaj peti monerojn. Dum nia irado tra la sola strato de la dense loĝata vilaĝo, ili svarmis ĉirkaŭ ni kun petoj pri mono aŭ fotografiaĵo aŭ simple por rigardi la plej lastajn specimenojn de la turista raso. La knabetoj estis nudaj, sed la "marioj," kaj "marietoj" vestis dikan ĝisgenuan jupon el verdeta pajlo, kiu donis al ilia irado certan svingantan gracion.

Mallumaj kaj varmaj estis la pajlaj domoj, preskaŭ ĉiam el nur unu ĉambro, kun antaŭa perono, sur kiu kaŭris maljunulo revanta pri heroaj faroj de sia juneco, aŭ virino plektanta korbojn aŭ kuiranta rizon aŭ legomojn kun helpo eble de plej moderna petrola forno aŭ fritkaserolo de plej nova tipo. Kaj ĉiam la ondoj rompiĝis dolĉe sur la bordo sub la domoj. Se venos iam tajda ondeggo, la tuta vilaĝo kaj domanaro fornaĝos... kien?

El bela ligna preĝejo de Londona Misia Societo sonis himno, elkore kantata de centoj da junaj voĉoj. La himno ĉesis, kaj elkuris la infanoj gaje kaj babilante tute same kiel Eŭropaj infanoj ellasitaj el lernejo, eĉ dimanĉa lernejo. Plua svarmado, plua petoj pri fotografiaĵo, kaj laŭta vigla komento pri la turistoj, malŝelice en nekomprenebla indiĝena lingvo.

Kun tia sama eskorto de babilantaj infanoj, klaĉantaj virinoj, seriozaj grizetaj maljunuloj, ni reiris al la motorsipeto kaj tiam al la ŝipo. La horo venis, kaj Port Moresby grade forfandiĝis sub la blua horizonto. Al Samaraj!

Samaraj (kun akcento sur la unua silabo) estas juvelo, multekolora, kalejdoskopka, karesa juvelo. Aro da insuletoj staras proksime de la bordo kun siaj altaj, nubkovritaj montoj,

kaj la plej malgranda el ĉi tiuj insuloj estas Samaraj. Oni povas ĉirkaŭiri ĝin piede en duonhoro..., sed kiom oni vidas en tiu duonhoro! La kvieta ĉefa strato de la vilaĝo, despli kvieta pro manko de veturiloj, kondukas en densan boskon de superpendantaj arboj, kaj el tio en mallargan aleon de kroton-arbustoj (latine, coediae), kies foliaro brilas per hele flava, purpura, bruna, ora, nigra, karmezina, eĉ verda koloroj. Kaj tiam oni revidas la maron, kun pura, flava bordo kaj neĝe blanka ŝaŭmo, blua kaj verda profundo, briletanta per miliardo da pintoj, kie ĝin ekkisas la suno.

Oni staras kelkan tempon en ravo, kaj poste daŭrigas la iradon inter palmoj ĉe la akvorando. Palmoj. Kio estas en Aŭstralio la eŭkalipto, tio en tropiklando estas la palmo. Iom Esperantista arbo. Sur la supro de ĉiu longa, senbranca, bruna trunko, dika je 35 centimetroj, alta ĝis 18 metroj, staras verda stelo. La rondforma foliaro, akre reflektanta la lumon per mil bajonetpintoj, havas aspekton de granda stelo, iom kruela stelo, brilanta kun ŝtala indiferento super la homa vivo, sufero kaj morto. Mi diris nur: iom Esperantista arbo. Ni Esperantistoj ankoraŭ ne bajonetas nin pri -io kaj -ujo, pri gazetartikoloj aŭ Akademias decidaj.

La palmoj brilas ĉiam, kaj oni iras ĉirkaŭ la insulo, kiel bona turisto, preter la malbela ligna kazino de la indiĝena polico, la vertikala krutaĵo de Samaraj-monteto kaj la soleca angulo nomita (kompreneble) Promenejo de Amantoj, kaj revenas al la ŝipo. Amaso da kriantaj brunuloj malŝargas ĝin kun senfina bruoj kaj babilo, kiel aro da lerneĵanoj, kiuj faras la taskon pro amuzo. Kiu sendas ion al la insuloj, paku ĝin zorge! El cent kestoj da petrolo portitaj el la ŝipo en tiu tago, eble tridek ne estis plimalpli difektitaj. Rivereto da petrolo fluas sur la ŝipstacio de Samaraj. Laodoro strange miksiĝis kun laodoro de indiĝenoj; jes, la veremo devigas la konfeson, ke la bruna frato havas senteban odoron, kiu en Samaraj estas pli forta, ol en iu loko, kiun sinjoro Delsudo vizitis. Espereble laodoro de la Eŭropanoj ne estas por la brunulo egale dolora.

Apud Samaraj troviĝas la plej bela

hejmo en la mondo; se ĝi ne estas mi volonte veturos longe por vidi belan. Sur apuda insulo, la gastama misiisto kaj lia edzino, ĉarme akceptis dekdu pasaĝerojn, kiuj grimpis centon da metroj sur la maro por ĝui el la vastaj, ventverandoj senegalan vidon de markolo, montaro kaj insuloj, ravegajn perspektivojn de valeto ombro kaj herbo, kaj brila bordo koloroj neimageblaj. Ĉio vidita Samaraj mem estas ĉi tie deklariĝinta, en dekofoje pli bela formo en ĉarmaj kadroj el palmaroj, trunkoj kaj suproj, el branĉoj kaj foliaroj aliaj abunde kreskantaj arboj. Kiel, en tiuj kadroj, pli hele brilas koloroj!

Koloroj. Oni malesperas. Tio lukso de safira maro, blankaj ondaroj, arĝente flava sablo, lazura ĉielo, blankaj montoj, ruĝetaj blankaj nuboj, pura verda markolo, brunaj rokoj, flava brunaj dometoj de indiĝenoj, la senfina, volupta abundo da verdaj kreskaĵoj sur ĉiu kvadrata metro de grundo. Oni preskaŭ perdas povon admirii, kaj simple ensorbas spektaklon por poste ĝui kaj rememori en la memoro. Samaraj, beleco! La du ideojn oni ne povos plu disigi.

Beleco pasas, Samaraj devas ankoraŭ pasi; kaj ni ekiris de la ŝipstacio, kaj la tuta loĝantaro de Samaraj adiaŭsinis nin, kun dolĉaj rememoroj pri la babilo de hieraŭ-nokto, kaj promesoj, pri nepra skribado de leteroj (ho, tiuj promesoj!); la palmoj, la radiotelegrafa masto, la domo sur la monteto dronis en la verdo kaj blua. Inter la eroj de la vasta insularo preter la domo de Beatrico Grimshaw, en kies romanoj la koloroj de Nov-Gineo estas eĉ pli helaj, ol en la vero (se tio estas ebla), kiel la aventuroj estas ankoraŭ malpli kredetaj, ol en la vivo (se tio estas ebla), nia ŝipo ekfosis longan sulkon el ŝaŭmo, kaj la lasta stadio de la vojaĝo al nordo komenciĝis.

A. Delsudo.

Unua Helpejo.

Ĉiu abonanto jam nun ricevis bele prezentitan broŝureton per kiu la firma Burroughs Wellcome & Co. Londono, (Anglujo), per bona esperanto, propagandas siajn farmaciajn specialaĵojn, precipe la ekipojn por unua helpejo en okazo de akcidentoj. Konsilinde estas, ke ricevintoj mendu ion skribante la mendon esperante,

Recenzo.

Alice in One Dear Land, de George Collingridge, Hornsby, N.S.K., Aŭstralio. 58. Tio ĉi estas, libro kiun infanoj legos plezure, pli plezure plenaĝuloj. Ĝi estas angle verkita de samideano. Ĉiuj kiuj scias "Alico en Mirlando" tuj demandas al si ĉu la jena libro estas iom simila, kaj ili plezure legos ke tie sin trovas la sama spriteco kaj la sama Alico. La "Kara Lando" estas Aŭstralio, kaj anstataŭ la Blanka Kuniklo, nin amuzas Dromajo kaj Kanguruo. Tute ĉirkaŭita de humoraĵo troviĝas tre freŝa pentraĵo de la ĉiam nova Aŭstralia densejo. Sendube Indigena Urso kaj liaj amikoj estas saĝuloj inter saĝuloj, sed ili atingis tian superecon per Esperanto, kiun ili scias kaj ĉiutage uzas.

Tra La Mondo. Internacia Legolibro, kolekta de Paul Bennemann. Unua parto, por komencantoj. Havebla de Ferdinand Hirt and Sohn, en Leipzig. Prezo 10 markoj.

Jen ni havas libron kiu estis longe bezonata de la esperantista mondo. Ĝi estas aro da proverboj, aforismoj, sentencoj, fabeloj, fabeloj kaj rakontoj, interesaĵoj el la vivo kaj sciencoj, ŝercaĵoj, amuzaĵoj kaj kantoj, ĉiuj tre interesaj kaj ne tro malfacilaj por komencantoj. La multaj bildoj estas bonaj, kaj la libro estas bele eldonita. Ĝi plenigas breĉon en nia literaturo.

L'Esperanto et les Associations Internationales au Congrès Mondial de Bruxelles, 1920. Prezo 2 fr.

Je ĉi tiu kongreso la plimulto decidis pro artefarita lingvo kiel lingvo internacia, kaj multaj inter ĉi tiuj subtenis Esperanton.

Essai sur la Derivation Comparee dans les Langues Naturelles et Artificielles, de Camille Aymonier. Prezo 2 fr.

La aŭtoro tre detale diskutas lingvojn naturajn kaj artefaritajn, montrante la logikecon de Esperanto kaj la difektojn de Ido. Iom surprize ĉi tiuj du libroj estas presitaj france ĉe la Centra Oficejo Esperantista.

Europa Unuigita. V. Zielinski, Galata, Panteleimon Han, Konstantinopolo.

Tiu ĉi libro estas praktika uzo de nia lingvo por diskuti grandajn aferojn kaj tiamaniere ne sole helpas la movadon Esperantan sed ankaŭ

sciigas argumentojn pacifistajn al la tuta mondo. Multaj faru tiel!

Esperanto kaj la Blinduloj.

Ĉiuj Esperantistoj bone komprenas, ke la genio de nia amata majstro, D-ro Zamenhof, alportis glorindajn kaj mirindajn benojn al la tuta homaro; ĉiuj vere scias, ke per la uzado de lia lingvo, ni povas interkomuniki kun la popoloj de ĉiuj landoj; fari vojaĝojn eksterlanden; supersalti ĉiujn landlimojn; eviti ĉiujn lingvajn malkomprenigojn; interŝanĝi facile kaj klare ideojn kaj opiniojn kun ĉiuj fremdaj samcelanoj. Unuvorte, ke Esperanto pligrandigis la ĝojon de la vivo, kaj plibeligis por ni ĉiuj la tutan teron.

Tiom multe Esperanto faris por vi kaj mi, ĉu vi komprenas, kiom pli multe ĝi faris por niaj blindaj samideanoj? por la kompatindaj homoj, kiuj, ĝis akiro de nia lingvo, devis vivi izolitajn vivojn, sen la povo vidi la belecojn de la ĉielo, de la maro, kaj de la tero; por kiuj la tuta naturo, la montoj, la valoj, eĉ la floroj, estas nur mallumeco, nur longa kaj senĉesa nokto? Por ili, Esperanto signifas novan ĝojon, pli freŝan intereson, pli riĉan pli belan ekzistadon. Ĝi alportis en iliajn korojn grandan entuziasmon; ĝi plenigis iliajn spiritojn per brilantaj aspiroj, per novaj kaj belaj esperoj kaj celoj; ĝi ebligis, ke ili, per legado de la ĵurnalo: "Esperanta Ligilo," redaktata kaj eldonata de S-ro Thilander, partoprenu en la ĉiutaga vivo de blinduloj en ĉiuj regionoj de la mondo. Ili ĉesis esti izolitaj suferantoj sen lumo en siaj vivoj; ili fariĝis fratoj kaj amikoj, unu kun la aliaj. Esperanto ne povis malfermi por ili la korpajn okulojn, sed ĝi almenaŭ povas malfermi por ili la spiritan vidpovon. Ĝi donacis al ili grandan benon kaj ĝojon. Ĝi alportis al ili iom da lumo; ĝi estas por ili brilanta stelo, gvidanta ilin al la gloro de kunfrateco.

Sed ĝis nun, la blinduloj ricevis tiun bonon el Esperanto pro la senlacaj klopodoj kaj sinoferadoj de tiaj homoj, kiaj estas sinjoroj Cart, Stejskal, Jung, Merrick, kaj laste sed eble la plej bone, Thilander. Tiuj ĉi homoj dediĉis grandan parton el siaj vivoj, por havigi por la

blinduloj taŭgajn literaturajn riĉaĵojn. Nuntempe, la centro de ĉiuj iliaj entreprenoj estas la ĵurnalo "Esperanta Ligilo," kiu havas pli ol 600 blindajn legantojn! Ĉu vi kompreneblas la veran signifon de tiuj ciferoj? Pli ol 600 samideanoj, kiuj ne povas vidi, kiuj vivas en senĉesa mallumeco! Kaj hodiaŭ, "Esperanta Ligilo," la sola fadeno, kiu tenas ĉiujn tiujn homojn kune, kiu alportas al ili iom de espero kaj ĉojo kiu alportas al ili sciigojn de la ekstera mondo, eble perdiĝos pro manko de mono! S-ro Merrick, la bone konata angla blindulo, kiu laboras tiel energie por helpi al siaj pli malriĉaj suferantoj, petis al mi, ke mi helpu lin detrui la danĝeron. Ke la danĝero ekzistas, mi bone scias; sed mi ne povas imagi, ke la bonkoreco de la Esperantistaro permesos, ke tiu granda kaj doloriga katastrofo okazu.

Oni bezonas proksimume 3000 spesimilojn ĉiujare por savi la ĵurnalon, vere malgranda sumo inter tiom da samideanoj. Ĉu vi volas helpi la aferon? Ne sufiĉas sendi malgrandan sumon al la kasisto. Necese estas vekigi la tutan Esperantistaron al vera sento de la devo partopreni en la afero.

Pro tio, mi sendas al la redaktoroj de ĉiuj Esperantaj ĵurnaloj kopiojn de ĉi tiu alvoko, kun peto, ke ili afable ĝin presigu; samtempe, mi petas al ĉiuj delegitoj de U.E.A. ke ili metu la alvokon antaŭ siaj lokaj grupoj, por ke, je la unua semajno en Januaro, ili faru ĉiujare monkollektojn por subteni la "Esperanta Ligilo," kaj per la donacoj helpu al s-ro Thilander, ke li daŭrigu siajn grandiozajn servadojn por pliiĝigi la vivadon de niaj blindaj samideanoj. Se vi konus la historion de s-ro Thilander, vi komprenus, ke li estas unu el la plej noblaj homoj en la mondo hodiaŭ, ĉar, spite de multaj suferadoj, spite de blindeco kaj malforteco, li dediĉis ĉiujn siajn povojn por helpi al la blindularo. Li meritas tion, kion ni povas al li doni.

Ne kredu, ke aliaj personoj sendos sufiĉe da mono por la afero. Faru vian plejeblon por ĝin sukcesigi. Rigardu la ĉielon la sunon, la lunon, kaj la stelojn, kaj kiel dankoferadon al la Bona Dio, ke Li donis al vi la eblon vidi, sendu al via grupo

donacon por ĉi tiu celo de simpla kaj amo.

Donante al ni Esperanton, majstro metis en niajn manojn povon fari grandajn servojn al homoj patindaj homoj ĉiulandaj. Donu via eblo responde al ĉi tiu alvoko kaj varme kaj entuziasme instigu viajn samideanojn sekvi vian ekzemplon. Por gajni plenan sukceson monkollektoj en ĉiuj grupoj tutmonda estas nepre necesaj; tial mi petas, ke ĉiuj samideanoj, kiuj legas miajn vortojn, tuĵ arangos la aferon en sia propra grupo aŭ intersiaj amikoj ne-esperantistaj. Monon oni povas sendi aŭ al redaktoro de ĉi tiu ĵurnalo, aŭ al delegito de U.E.A. en via urbo. Se preferus, sendu ĝin rekte al s-ro Percy Merrick, Woodleigh, Shepperton, Anguljo.

JOHN MERCHANT,
Vic-Prezidanto de Brita Esperanta Asocio.

Kroniko.

Melburno, V.—S-ro Cohen parolis pri Esperanto antaŭ kunveno pri Hooker's Cafe. Generala konvencio sekvis, kiam kelkaj ĉeestantoj diris, ke ili jam aĉetis lernolibron kaj eble pli interesiĝos.

Kampara promeno de iuj Melburnaj membroj de A.E.A. ĉe Darling, sabaton la 10 decembro, estis sekvata de muzika vespero en domo de s-ro Cohen, vic-prezidanto.

Sidnejo, N.S.K.—La 3an de decembro s-ro W. J. Edwards donis interkonsilan parolon antaŭ la Workers Educational Association.

London, 19 decembro, s-ro J. Edmonds, Norda Sidneja Altlernejo, s-ro P. J. Bennett, sekretario de la asocio de lernejestroj, s-ro J. Jolliffe kaj s-ro F. V. Taylor parolis ĉe speciala kunveno de instruistoj ĉe la Assembly Hall, strato Loftus.

La Sidneja Esperanta asocio nun kunvenas ĉiun vendredon ĉe la School of Arts, Pitt Street, je la oka.

Rabaŭl, Nov-Gineo.—Estas komencita malgranda Kurso por ĉino, kiuj lernas per Germana lingvo, kun aprobo de la estro de unu ĉina lernejo. Unu lernanto estas miksrasa, Ĉino-Melaneziano. Kelkaj Eŭropanoj ekstudis la lingvon, kaj espereble estos baldaŭ Eŭropana grupo ankaŭ.

Brazilia Ligo Esperantista kaj la Ligo de Nacioj.

La 10an de Aŭgusto 1921 la Brazilia Ligo Esperantista subskribis la sekvantan rezolucion:—
"Sroj. Prezidanto kaj Ceteraj Anoj de la Ligo de Nacioj.

Konsiderante, ke, laŭ la unuanima konsento de la instruistoj, pli kaj pli montriĝas la neceso de neŭtrala komunua idioma, faciliganta la interkomunikojn de la popoloj ĉe iliaj ĉiuspecaj rilatoj;

Konsiderante, ke pro motivoj evidentaj ne estas permesate esperi la solvon de tia problemo per iu ajn el la historiaj lingvoj jam mortintaj kaj ankaŭ per iu ajn el la nunaj idiomoj, parolataj de la popoloj sur la tuta mondo;

Konsiderante, ke la neŭtrala helpa lingvo "Esperanto" jam estas disvastigita tra ĉiuj civilizitaj centroj de la Tero;

Konsiderante, laste, ke eminentaj filologoj kaj notindaj homoj en ĉiuj branĉoj de l'homa aktiveco jam sin deklaris favoraj al tiu internacia lingvo, kies vivpovo kaj efikaj praktikaj aplikadoj jam estas sufiĉe elmontritaj;

Ni petas, respektplene, al la honorinda Ligo de Nacioj doni sian valoran moralan apogon al la Esperanta afero, apogo, kiu sin montros per iaj ajn agoj aŭ decidoj, laŭ la kriterio de la Ligo, atentinte la helpon, kiun la neŭtrala lingvo povas doni al la konservo de la paco kaj kunfratigo de la popoloj."

Preskaŭ 200 anoj metis sian nomon al la rezolucio. En la listo oni vidas la nomojn de parlamentanoj, juristoj, kuracistoj kaj de membroj de ĉiu alia profesio kaj metio.

La Kvara Kongreso.

En venonta Pasko la kvara Aŭstralia Kongreso de Esperanto okazos en Hobarto. Vic-prezidanto Cohen kaj sekretario Redfern aranĝos tagordon. Ili tre deziras, ke ĉiu kiu partoprenos la kongreson, sendu sian nomon kun helpaj sugestioj al la sekretario.

Esperanta Finnlando volas ricevi n-ro 6 de la Suda Kruco. Kompense oni ricevos ekzempleron de Esperanta Finnlando. Sendu al Box 1367.

La Vilag'a Lernejknabo.

De Den Fenella.

La knabo dum la freŝa frumateno.
Lernejen malrapidas, atendante
La certan, ĉiutagan mortigadon.
Li verŝas larmojn ofte, ofte blovas
Kun furiozo sur brulvarmajn
fingrojn,

Per tio, espereble, dolĝigante
Al tiuj la doloron de la kano.
Ho ve! ankoraŭ mi neniam aŭdis,
El historioj aŭ fabeloj legis,
Ke la knabeco ĝuis bonajn tempojn,
Ke iam trafis ĝin agrabla sorto.
La lernejknabo estas, kiel hundo,
Al kiu oni donas piedfrapojn,
Sur kiun oni ĵetas grandajn brikojn.
La tutan tagon super li dependas
La ledpunilo aŭ fleksebla kano.
La ofiĉiro en la bluaj vestoj
Ne traktas lin kun tro da ĝentileco;
Kolera patro hejme lin atendas,
Kaj dum li vagas tra la verdaj
kampoj,

Pri sukabundaj napoj meditante,
Maljuna Broun, la bienposedanto
Lin persekutas, kun sovaĝa krio.
Allogas lin en la aŭtunaj noktoj
La pomarbujo dolĉe odoranta,
Sed ruza Goody tie gardostaras
Kaj lin salutas per la balailo.
Al raba Ismaelo li similas,—
Li ĝenas ĉiujn, ĉiuj lin responde.
Sin levas kontraŭ li la tuta mondo,
Sur lin sidigas peze, senkompate,
Sed ĉion li travivas kaj denove
Stariĝas kun vizaĝo ridetanta.

C'u vi Legas?

Multa legado de la verkoj de bonaj aŭtoroj donas grandan helpon en la facila uzado de Esperanto.

El la verkaro de aŭtoroj rekomenditaj al niaj legantoj la Australasian Esperanto Association, Box 731 Elizabeth Street Post Office, Melb., povas liveri:—La Kamena Angulo, (Gego), 1/3; Lia Lasta Ŝanco, (Gego), 1/-; Lilio (Sinnotte), 3/6; Marta (Zamenhof), 5/-; Revizoro (Zamenhof), 3/3; Genezo (Zamenhof), 2/-; Rabistoj (Zamenhof), 3/3; Ifigenio en Taŭrido (Zamenhof), 2/3; Mirinda Amo (Lukyen), 3/-; Himnaro—nova eldono, 1/6; Esperanto Guide (Hyde), 2/6; Lingvaj Respondoj (Zamenhof), 1/6; Grammar and Commentary (Cox), 4/-. Baldaŭ alvenos nova provizo de Krestomatio, Millidge's Dictionary, Mimi, (Payson). Por poŝtpago aldonu unu pencon por ĉiu ŝilingo de libro prezo.

Komuna Intereso.

Verkis Matildo Direktilo.

(Daŭrigo).

Certe, Anastasia Timarkis, ke multaj el la venantoj al la biblioteko ekjetis rigardojn en ŝian direkton, sed per okuloj ne vidantaj ŝin, ŝi sentis al si, ĉar, fida kiel Juno ke ŝia diineco kaŝas sin kontraŭ maldeklataj mortemuloj, estis Anastasia, ke la denseco de la ombro muis ŝin en privateco. Tamen, kvankam la ombro ŝajnis tute kontentiga al Anastasia kun la brilega lumo de la biblioteko ankoraŭ en siaj okuloj, de la strato kaj la eniraj ŝtupoj, al okuloj en la pala lunlumo, ĝi estis tute apenaŭ ombreto; kaj la preterpasantoj, ekvidinte ŝin, miris pri la bone vestita virino kaŝanta sin kaj mananta tie.

Anastasia estis finanta sian duan bulon, kaj ŝi havis ankoraŭ du por mangi kiam venis al ŝi deziron rigardi la preterpasantojn kun pli vigla intereso, ĉar ŝi tiam ekmemoris, ke la sola viro, por kiu ŝi sentis daŭran intereson, multe amis librojn. Ŝi havis nenian veran esperon ke ŝi vidos lin, sed ŝi prenis la fantazion, ke li venos, kiel motivon por rigardi la dramon.

Sia mano estis en sia saketo kaj ŝia intereso en la preterpasantoj momente defalita, kiam ŝi subite konsciigis, ke iu staras antaŭ ŝi, invadante ŝian propran, specialan ombron, kaj dirante en preskaŭ senspira flustro de surprizo, ĝojo, kompato kaj embaraso, "Vi, ankaŭ!"

Anastasia, kun indigno kontraŭ la perfido de la ombro nekaŝinta ŝin, kiel ŝi certis ke ĝi promesis fari, kun sia intereso en la dramo de la preterpasantoj tro abrupte atinganta la apogeon kiun ŝi fiksis por ĝi, kaj kun la Juno simila digno kaj supereco forfrakasitaj el ŝi de la sola persono antaŭ kiu, super ĉiuj, ŝi deziris konservi ĝin, nur diris, "Ho!" kaj kaŝis sian saketon kun la eltirita bulo post sia dorso.

"Mi ĵus estis elirinta el la biblioteko," diris la viro antaŭ ŝi, "kaj estis staranta en tio, kio ŝajnas al mi speciale bona ombro, apud la dua kolono en la maldekstro de la kolonaro, kiam mi vidis homon fikse rigardanta en ĉi tiun direkton. Mi pensis, ke mi ankaŭ prenos vidon. Kiam mi vidis vin, mia koro stariĝis tute senmove, kvankam miaj piedoj

funkciis sufiĉe bone, ĉar dum unu sekundoj mi estas el la ombro, mi supre kie la rigardanto estis, kaj tie."

Li portis saketon tre similan tiu, kiun la fraŭlino tenis. Anastasia, en la lastaj tri semajnoj, estis uzinta sian ĉerbon, kiel ŝi ne ĝin dum ses jaroj. Rapide, post unua surprizo, ŝi ekkomprenis signifon de la situacio en kiun trovis sin. Ŝi ridis, "Mi serĉis kiu ŝatas librojn, sed, se vi estas kiu ŝatas sukerpanon —"

"Sukerpanon!" li diris, "mi pensis pri sukerpano. Mi aĉetis sandviĉojn. Prenu iom? Jes, tre amas sukerpanon."

Ŝi akceptis unu el liaj sandviĉoj kaj li prenis sian lastan bulon sukerpano. Tiam, ĉio en la ĉirkaŭstancoj ŝajnis tiel natura, ke ŝi manĝis kune, tiel indiferentaj pri preterpasantoj, kiel du paseroj en foŝlasita fruktarbaro aŭ kiel Juno kaj Jupiter mem for sur Olimpo. Ŝi sentis sin plezure sekura kun la granda, larĝa korpo kaŝanta sin de la fronto, kaj li kun sia dorso al la publiko estis tute forgesinta ek de krom tiu antaŭ li.

"Ĉu Melburno ne estas mortigita," plendis Anastasia, "kiam oni ne povas ŝpari sufiĉon por manĝi restoracio, kaj estas tro mallume por iri al la ĝardenoj, kaj oni ne havas tempon por iri hejmon, kaj oni estas tro bone vestita por preni kuraceman manĝi irante tra la stratoj, kaj la sola fervoja atendejo ĉi tiun flankon de la barieroj havas afiŝon malpeze mesantan manĝadon en la ĉambroj kaj oni ne konas iajn aliajn lokojn krom preĝejoj, kaj oni havas riverencsenton kontraŭ manĝado ekde ili, kaj oni estas tiel malsata, ke la plej malestiminda vagulo povas viti tion en la tuta maniero—ho! Ĉu ne estas—"

"Ĝi estas la diablo, Anastasia, por virino. Mi estis ironta al la Ekspozicia Ĝardeno, kiam mi ekvidis tiun ombron, kaj, estante malsatega, mi pensis pri ŝparo de tempo—"

"Ĉu vi ankaŭ estas en malbona ŝanco de kiam mi laste vidis vin?"

"Jes, kaj vivanta en malhela, malgranda ĉambro en Norda Melburno. Sed, kiel estas, ke vi ne havas oficon Anastasia Lang?"

"Ĉar mi estas vera idiotulo, Joseph Strawn."

"Mi ne aŭskultos al tio, Anastasia."

"Kion vi scias pri mi," diris Anastasia laŭ maniero balanciganta inter frivoleco kaj sindona cede de ŝiaj sentoj por ĉi tiu homo," vi, kiu havas intereson en nenio krom konteco, kaj kiu ĉiam aspektas tiel simila al kalkulada maŝino, kiel ia homa estaĵo povus, kaj kiu apenaŭ donas al iu ajn ordinaran homecan konversacion?"

"Mi ja ne estis tia, vere!"

"Do, kial vi aspektis tia?"

"La pento, Anastasia. Mi estis estinta malsaĝulo, malŝparante mian tempon kaj monon kaj akirante nur ŝuldojn; kaj, kiam mi konatiĝis kun vi, mi sentis fortan deziron doni al mi mem antaŭenpuŝon. Mi faris mian eblon dum la lastaj du jaroj. Mi havis bonegajn esperojn ĝuste antaŭ ol la pereigo okazis. Nun mi havas ĉirkaŭ funton en kontanta mono, kelkajn malgrandajn ŝuldojn kaj—"

"Kion alian?"

"Amatinon, kiu devus atendi almenaŭ kvin jarojn antaŭ ol mi povus havi la arrogantcon peti ke ŝi edziniĝu kun mi, eĉ se mi trovus bonan oficon hodiaŭ nokte. Tial, mi perdis ŝin, ĉar mi tute ne petos ŝin."

"Vi devus doni al ŝi ŝancon diri ĉu ŝi atendus aŭ ne."

"Sed mi estas tia neelektinda persono, kaj ŝi estas tia belega virino, ke ŝi povus fermi siajn okulojn, kaj dirante, 'Eena, deena, dina, dough,' elekti inter almenaŭ dudek viroj pli havindaj ol mi."

Anastasia admonis lin pro tio ke li traktis la aferon malserioze.

"Li eklevetis la ŝultrojn dirante, 'Do, kiam oni estas preskaŭ sen mono dum tri malagrablaj semajnoj, kaj ne ŝatas grumbli, li kredeble ŝajnis ke eĉ la lasta pajlo ne aldonas pezon; sed mi konfesas al vi, notu. Tio estas privilegio, kiun oni cedas al plej estimindaj geamikoj."

"Kial vi ne provas la efikon de ĝi sur via amatino?"

"Ĉu tio estas via sincera konsilo, Anastasia?"

Ŝi tiel forte vibris per la ĵaluzo, ke ŝi penis pensi pri io komika diri por purigi sian koron kaj redoni al si iom da estimo por si mem, sed ŝi nur murmuris, "Vi ne bezonas konsilon de mi. Kaj donu al mi alian sandviĉon, mi petas. Vi manĝis tutan mian lastan bulon."

Dum li pasigis al ŝi la saketon da sandviĉoj, li metis antaŭ ŝi ankaŭ dolorigitan rigardon por ŝia kompreno. Ŝia koro estis tuŝita de kompato, sed ŝia kormoleco ne povis superregi malgrandan kontenton en lia doloro kiun ŝi akceptis kiel iom da kompenco por la ĵaluzo, kiun li vekis en ŝi.

"Ĉu vi havas promeson de ofico?" li demandis.

"Mi devos intervui homon je la sepa en oficejo sur strato Bourke," ŝi respondis. "La ofico ne estas alloga. Tamen, se mi ricevos ĝin, mi okupigos mian libertempon lernante esti unua klasa kuiristino."

"Kuiristino? Ĉu vi intencas edziniĝi?"

"Kiel malsaĝaj viroj estas! Kuirado ja signifas edzecon, kaj edzecon nur signifas kuiradon!"

"Ho, Anastasia!" li diris riproĉe.

"Ho, Joseph!" ŝi respondis, frivole ironia.

"Sed, Anastasia—"

"Mi intencas studi la kuiradon, se mi ne povos akiri stenografian oficon kie malsaĝa kreitaĵo, kiel mi, ricevos sufiĉon por vivi egale komforte kiel kuiristinoj. Kuiristinoj de unua klaso estas pli elserĉataj kaj ricevas pli grandajn salajrojn ol malbonaj stenografistoj.

Mi ne estas tute nescia pri la kuirado eĉ nun; kaj, se mi ne sukcesos hodiaŭ nokte, mi akceptos postenon de ordinara, familia kuiristino en dolĉa, malgranda familio, en unu el niaj dolĉaj, malgrandaj antaŭurboj. Kaj jam nun mi devas adiaŭi vin."

Ŝi elparolis ĝin per forta peno kvankam kun ia fiereco por impresi iun ajn kiu inklinis pensi, ke ŝi estis venkito de la sorto.

"Mi devos renkonti homon sur strato Flinders je la sepa kaj kvarono," li diris. "Mi akompanos vin ĝis strato Bourke; kaj poste ni atendu unu la alian sub la kupolo ĉe Flinders-strata stacidomo ĉirkaŭ la oka, kaj ni povos rakonti kiel ni sukcesis."

Ili disigis sur strato Bourke kaj je la horo aranĝita renkontiĝis ĉe la loko nomita.

"Mi ricevis mian, kaj ĝi estas bonega," diris Joseph gaje "Kia estas via?"

"La homo diktis al mi longan pecon por provi mian stenografian

kapablon, kaj mi ne povis legi tion, kion mi skribis," ŝi diris. "Mi intencas fari familian kuiraĵon."

Anastasia, malgraŭ sia konvinko pri la digno de ĉiu bona laboro, sentis sin humiligita, sed Joseph pensis, ke ŝi estis vestita pli reĝine, ol antaŭe, en la tuta digno kiun ŝi decidis konservi kiam la maljuna vagulo rigardis ŝin kiel unu el la venkitoj de la sorto.

"Ho, mi volas," diris Joseph, tiam haltis.

"Kion?" Anastasia demandis.

"La mia estas mirinda ofico," li diris. "Mi povos subteni ordinaran kuirstinon — mi intencas diri, belan edzinon, kiu povos fari ordinaran kuiraĵon — jes, post, eble, du jaroj, mi povos subteni ŝin en komforto, kaj atendi de ŝi nur regadon de alia kuirstino."

"Vi devus diri tion al via amatino, kvankam mi estas certa, ke mi ne dirus ĝin al ŝi," diris Anastasia, rigardante la homanason preterpasantan kaj ne fidante siajn okulojn neagitive renkonti Joseph.

"Ho, Anastasia, kial?" li demandis.

"Diri al vi la veron, mi pensas, ke via amatino ne indas vin; alie, ŝi estis antaŭ longe inspirinta en vin kuraĝon peti ŝin atendi kvin, dudek, ian ajn nombron da jaroj," diris Anastasia, penante esti frivola, sed sentante sin tute ekster ĉio havinda en la mondo.

"Anastasia?"

Estis io en lia tono, kiu devigis ŝin suprenŝuti rigardon rekte en liajn okulojn.

"Jam nun dum vi ja estas rigardanta min, ĉu vi ne povas vidi ion?" li demandis kun la koro kvazaŭ staranta sur la okulharoj atendanta por ke ŝi prenu ĝin en la manojn por li plej delikataj.

Tiam, kiel la printempo iam ekebligas el burĝonoj por renkonti ardegan someron, tiel la rozoj rapidegis al ŝia vizago, kaj la senditaj de ŝiaj okuloj li ne povis ne kompreni.

"Do, tio estas tio," li diris kontente, prenante ŝian brakon; kaj, dum li kondukis ŝin al la lukso de tramveturo, "Ho, kia beno," ŝi elspiris feliĉe, "ke ni ambaŭ estis tiel malsataj."

Japana Gastejo.

S-ro H. B. Schwarz, aŭtoro de "Togo's Land," priskribas en la libro interalie japanan gastejon, kio multo interesas, kaj able estus intereso al alinaciaj samideanoj, kiuj estas tute fremdaj al la moroj de la lando de la Leviganta Suno. Tial mi ĝis mallonge kaj kun iom da ŝanĝo esperantigis kiel jene:—

En japana gastejo sin ne trovas seĝo, tablo, fajrejo arda, neĝblanka tuko, saŭmanta pokalo da biero aŭ glaso da vino, granda peco da rostita bovajo, dolĉa panbulo, orkolora butero, krema fromaĝo. Oni sidigas sin sur la piedojn sur kusenon meze rigaŭtanta du futojn kvadrate. Tamen estas multe da komforteco ĝuebla en bonordigita japana gastejo.

Enironte oni devas demeti la ŝuojn, kiujn unu el la servistoj zorgas en metas en ŝrankon ĉe la pordo. Oni trovas la ĉambron tre pura. Ĝi enhavas nenian pezan meblaron kaj tanton polvon. La planko estas kovrita per dikegaj matoj, ĉiu el kiuj havas larĝon da 3 futoj kaj longon da 4 ĝis 6 futoj. En la ĉambro oni trovas "Kakemono" aŭ pendpentraĵon, vazojn kun floroj aŭ herboj, kadriaĵojn, devizo kaj skribtablo alta je unu futo kaj enhavanta 2.5 kvadratajn futojn. Silka aŭ katuna kusenon estas alportata anstataŭ seĝo. "Hibachi" aŭ fajrujo el ligno aŭ metalo kun kelkaj da fajrigitaj lignokarbo, sur kiu boligas da varmaga akvo gaje bruetas, servas kiel forno. Pli da karbo estas liverata en alia ilo, por ke oni ne bruligu la pipon, kaj, kiam la plej bona kuko kaj teo estas proponata, la japana ideo por sintrankviliigi estas tute kontentigata.

Ĉiuj japanaj manĝaĵoj ŝajnas belaj kaj kelkaj el ili estas vere bongustaj, sed ŝajnas, ke la manĝtempo ne estas fiksita. La ĉefmanĝo estas vespera. Ĝi estas servata per du aŭ tri platoj kaj konsistas el supo kaj diversaj specoj de fiŝo bolita aŭ rostita, tute ne kuiritaj. La lasta estas tranĉita je maldikaj pecoj kaj estas servata kun diversaj legometoj kaj "ŝoju" japana saŭco. Rizo prenas lokon de pano, kaj sin trovas ne frukto.

Post vespermanĝo, la ĉambro, kiu estis sideo-kaj manĝĉambro jam ne fariĝas dormĉambro. Dikaj kusenoj estas enportataj kaj streĉitaj sur la matoj kiel litoj. Aliaj

grandaj estas surmetataj kiel kovriloj. En somernokto, granda verda kanaba moskitreto, kiu preskaŭ okupas la tutan ĉambron, estas pendata per ŝnuro de ĉiu angulo. Tiamaniere oni povas dormi senĝene. (el Verda Utopio).

C'u Ne Pli Alten...

De I. L. Perec, Eminentia moderna Hebrea verkisto.

...Kaj li malaperadis ĉiun matenon, antaŭ la "Indulgo-festo!" Oni vidis lin, nek en la ĉefa preĝejo, nek en la aliaj sinagogoj, kaj ankaŭ en sia domo li forestis. Malfermitaj estis la pordoj, laŭ volo ĉiu povis eniri: ĉe la rabeno oni ja ne ŝtelas; sed neniam viva estaĵo estis en lia domo. Kie povis esti la rabeno? Certe, en la ĉielo! Ĉu malmulte da aferoj havas rabeno antaŭ la "juĝa tago?" Izraelidoj petas nutraĵon, pacon, ŝancon kaj fianĉojn por siaj filinoj, sed la pekoj — ho ve, — estas ja tiom multe da pekoj, kaj la "prokurora anĝelo" per siaj mil okuloj rigardas de unu mondfino al la alia; li vidas, akuzas, denuncas... kaj — kiu helpos, se ne la rabeno?

Tiel pensis la judoj. Sed unu fojon venis "litvako" (litova judo) kaj mokas; superstiĉojn ili, la "litvakoj," malsatas, sed Talmudon ili scias preskaŭ parkere, do la litvako prenas libron el Talmudo kaj montras klarigon! — "Eĉ Moseo mem — li diras — ne povis dum sia vivo suriri la ĉielon, sed tenis sin en certa distanco sub la ĉielo!" Nu, ĉu oni povas konvinki litvakon? — sed kien malaperas la rabeno? — "Ĉu mi devas scii — respondas la litvako, levante la ŝultrojn kaj samtempe (artifiko de litvako!) elpensas planon por ekscii la aferon. La saman vesperon la litvako ŝteliras en la ĉambron de la rabeno, kaŝiĝas sub lia lito kaj kuŝas tie. Li devas — pensas li — maldormi la nokton kaj vidi, kien malaperas la rabeno kaj kion li faras dum la noktpreĝoj antaŭ la indulgo-festo. Alia ekdormus, sed litvako havas rimedon, li lernas parkere Talmudon! Meznokte, la rabeno jam ne dormas, sed nur ĝemas: "multaj estas la pekoj, kiujn la hebrea faris dum la jaro." Do, se alia aŭdas la plorĝemon de l'rabeno, li certe eksplorus... Sed "litvako ja havas feran koron," li aŭdas kaj ne mov-

iĝas! La rabeno kuŝas sur la lito kaj la litvako — sub la lito. Poste aŭdas la litvako knaradon de litoj... la domanoj ellitiĝas, lavas siajn manojn (preĝas) kaj foriras preĝejon... kaj ree ekregas morta silento, en la mal-luma ĉambro, kien enpenetras tra la fenestroŝirmiloj iomete da lunlumo... Kaj la litvako konfesis, ke kiam li restis kune kun la rabeno, — timego lin ekkaptis, la kapharoj leviĝis kaj kiel pingloj lin pikis. La penso mem, ke li estas kune kun la rabeno, **nokte, dum oni preĝas la antaŭfestajn preĝojn** turmentis lin!.. Sed litvako estas obstinulo kaj, tremante kiel fiŝo en akvo, li kuŝas. Fine la rabeno ellitiĝas... aliras al ŝranko kaj elprenas pakajon... montriĝas ukrainaj vestoj: tola pantalonon, altaj botoj, granda fela ĉapo, larĝa leda zono kun flavkupraj najletoj k. t. p. La rabeno sin vestas per tio ĉi... el la poŝo de l'ĥalato montriĝas granda ŝnurego... vilaĝana ŝnurego!

La rabeno eliras kaj la litvako — lin sekvas! Enirante en la kuirejon, la rabeno sin ekklinas, prenas hakilon el sub lito kaj enŝovante ĝin sub la zonon li eliras el la domo. La litvako tremas, sed ne forpaŝas. Mortsilento sin portas trans la mal-lumaj stratetoj. De tempo al tempo aŭdiĝas el fenestro jen voĉo de preĝanto, jen ĝemo de malsanulo... Kaj la rabeno iras ĉe la flanko de l'strato sub ombroj de l'domoj... kaj la litvako tremante sekvas lin paŝo post paŝo, jen ili jam estas ekster la urbo. Tie estas arbareto kaj la rabeno sin direktas en ĝin, irinte tridek-kvardek paŝojn li haltas apud arbeto kaj la "litvako" restas konsternita kaj timigita vidante, ke la rabeno elprenas la hakilon el-sub la zono kaj hakas la arbeton! Li vidas, kiel la rabeno hakas, li aŭdas la krakadon kaj knaradon de l'arbeto... La arbeto falas, tiam la rabeno dishakas ĝin ŝtipe kaj poste disfendas ĝin, kolektas kaj kunligas ĝin per la ŝnurego el la poŝo, metas ĝin sur la dorson, enŝovas la hakilon sub la zonon, eliras el la arbeto kaj reiras en la urbon. En strateto, apud mal-alta, malriĉa dometo li haltas kaj frapetas la fenestron. — "Kiu estas?" — oni demandas timigite el la domo. La "litvako" aŭdas voĉon de malsana virino. — Mi! — respondas la rabeno ukraine.

— Kiu vi estas? — oni ree demandas kaj la rabeno respondas: — "Bazilo."

— Kia Bazilo kaj kion vi volas, Bazilo?

— Lignon — diras la maskita Bazilo — mi havas por vendi! tre mal-kare, preskaŭ senpage!

Kaj ne atendante respondon, li eniras en la dometon, kaj la litvako ankaŭ eniras tien! per malhela lumo de l'mateno li vidas malriĉan dometon, disrompiĝintajn melblaĉojn... en lito kuŝas malsana virino envolvita per ĉifonoj kaj ŝi diras maldolĉe:

— Ĉeti? per kio mi ĉetu? Kion posedas mi, malriĉa vidvino? mi ne havas monon!

— Mi prunte donos — diras la maskita Bazilo — ĝi kostas nur ses groŝojn!

— Sed kiamaniere mi pagos al vi? — ĝemas la malriĉa virino.

— Malsaĝa homo — admonas ŝin la rabeno — ne esperas Dion, mi estas certa, ke vi pagos!

— Sed kiu hejtos ĝin en la forno, — ĝemas la vidvino, — mi ja ne havas forton kaj mia filo forestas.

— Mi ĝin ankaŭ hejtos, — diras la rabeno kaj enmetante la lignon en la fornon, la rabeno ĝemante preĝas la unuan antaŭfestan preĝon... kaj kiam li bruligis la lignon kaj ĝi bone ekflamis, li jam preĝis iomete pli vigle la duan preĝon... la trian preĝon li diris, kiam la ligno forbrulis kaj kiam li fermis la hejtfornon per lada pordeto...

La litvako, kiu tion ĉi vidis, jam fariĝis adepto de la rabeno.

Poste, se iu rakontis, ke la rabeno levigas ĉiun matenon, antaŭ la "indulgo-festo," kaj iras sur la ĉielon, — la litvako jam ne mokis, sed mal-aŭte diris:

"Ĉu ne pli alten li iras?!..."

El la antikva Hebrea lingvo tradukis,

ŝepetovka.

I. Muĉnik.

Felica Joc'jo.

Fabelo de la fratoj Grimm.

Jocjo, servinte sep jarojn ĉe sia sinjoro, diris: "Sinjoro, mi volas reveni al mia patrino, sufiĉe jam mi servis ĉe vi, donu al mi mian salajron." La sinjoro respondis: "Vi servis al mi fidele kaj honeste. Kia ago, tia pago" kaj donis al li pecon da oro tiel grandan, kiel lia kapo. Jocjo eliris el la poŝto tuj konvulsis la oron, metis ĝin sur la sultrojn kaj ekiris hejmen. Kiam li iris sur la vojo kaj ĉiam metis unu piedon antaŭ la alia, li ekvidis rajdanton fresan kaj gajan sur vigla ĉevalo. "Ah, bona afero estas la rajdado — diris Jocjo tute laŭte. — Oni sidas kvazaŭ sur seĝo, ne faletas sur ŝtono, ŝparas la ŝuojn kaj senpene vojaĝas." La rajdanto, aŭdinte tion, haltis kaj ekkriis: "Kial vi piediras, Jocjo?" — "Mi estas devigata. Jen mi portas pecon hejmen, ĝi estas oro, ĝi premeblas mian sultrojn kaj mi ne povas levi la kapon." — "Ĉu vi scias? — diris la rajdanto — ni intersangu: mi donos al vi mian ĉevalon, kaj vi donu al mi la pecon." — "Tre volonte — diris Jocjo — sed mi avertas vin, ke vi treniĝos kun la ŝarĝo." La rajdanto desaltis de l' ĉevalo, prenis la oron, helpis Jocjon sidigi, donis al li la kondukilojn en la manojn kaj diris: "Se vi volos rajdi rapide, klaku per la lango kaj krii hop hop!"

Jocjo estis tre fiera, ke li sidas sur la ĉevalo kaj rajdas kvazaŭ sinjoro. Post momento li ekpensis, ke li povas rajdi pli rapide. Li ekklakis per la lango kaj kriis hop hop! La ĉevalo ek trotis rapide, post kelkaj saltoj deĵetis sian rajdanton en foston, kio apartigis la kampon de la vojo. La ĉevalo estus forkurinta, sed tiam kaptis ĝin kamparano, kiu sur la sama vojo kondukis bovinon. Jocjo pene levis de l' tero siajn dolorajn membrojn kaj starigis ree sur la

HAROLD O PUDNEY

Kuracisto de Fonto-Plumoj

Ĉu vi havas kriplan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Portu ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facilaj por via monujo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Memoru la adreson:

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

piedoj. Li estis kolera kaj ekkriis: "Malsana afero estas la rajdado, precipe kiam oni havas tian ĉevalaĉon, kiel ĉi tiu, kiu deĵetas vin, ke oni povas rompi la kolon; neniam plu mi sidigos sur ĉevalon. Alia afero estas la bovino. Oni trankvile iras post ŝi kaj havas ĉiutage lakton, buteron kaj fromaĝon. Kion mi donus por havi tian bovinon." — "Se tio tiel plaĉas al vi — diris la kamparano — mi volonte prenos intersaĝe la ĉevalon por la bovino." Joĉjo konsentis kun ĝojo. La kamparano saltis sur la ĉevalon kaj forrajdis.

Joĉjo trankvile pelis la bovinon antaŭ si kaj ĝojis pro la feliĉa intersaĝo. "Se mi havos nur pecon da pano, kaj ĝi ne mankos ja al mi, mi povos ĉiam, kiam mi dezirus, manĝi ĝin kun butero kaj fromaĝo; kiam mi soifos, mi melkos mian bovinon kaj trinkos lakton. Kion plu, mia Joĉjo, vi deziras?" Veninte al drinkejo, li haltis, manĝis ĉiujn provizojn kiujn li havis por tag- kaj vespermanĝo kaj plena de ĝojo trinkis duonglason da biero por la lastaj heleroj. Poste li ekpelis a bovinon al la kamparo, kie loĝis lia patrino. Ju pli proksimiĝis la tagmezo, des pli forte bruligis la suno. Unu mejlon ankoraŭ la loko estis dezerta. Estis tiel varmege, ke la lango de Joĉjo algluiĝis de soifo al la palato. "Mi havas kontraŭ tio rimedon — pensis Joĉjo — mi melkos la bovinon kaj ĝuos la freŝan lakton." Li bindis ŝin al seka arbo kaj ne havante vazon submetis sian ĉapon kaj komencis melki. Vanaj estis ĉiuj liaj penoj ne aperis eĉ unu guto da lakto! Li tiel mallerte atakis la mametojn, ke fine ia malspacienca besto piedbatis lian kapon. Joĉjo falis senkonscia. Feliĉe post momento venis buĉisto, kiu veturigis junan porkon en puŝveturilo. "Kio okazis?" — diris li kaj helpis la bonan Joĉjon levigi. Joĉjo rakontis la tutan aventuron. La buĉisto donis

al li sian botelon kaj diris: "Refreŝigu vin. La bovino ne donados lakton, ŝi estas maljuna bruto, ŝi povas taŭgi nur kiel tirbesto aŭ en buĉejon." "Kiu povus tion supozi — murmuris Joĉjo, glatigante la harojn sur sia kapo. — Bone estas, kiam oni povas buĉi hejme tian bruton, — oni havas viandon. Sed mi ne tre amas bovaĵon, ĝi ne estas sufiĉe suka. Tia juna porko estas alia afero! Bonega manĝaĵo, kaj krom tio al kolbasoj." — "Aŭskultu, Joĉjo — diris la buĉisto — se tio faros plezuron al vi, mi donos intersaĝe la porkon por via bovino." — "Dio rekompencu vian bonan koron!" — diris Joĉjo, donis al li la bovinon kaj prenis de l' puŝveturilo la porkon, liginte ĝin per ŝnuro.

Joĉjo daŭrigis la vojon kaj pensis, kiel ĉio fariĝas laŭ lia volo; se io malagrabla okazis, tuj ĝi estis forigita. Post iom da tempo al li aliĝis junulo, kiu portis belan, blankan anseron sub la brako. Ili interparolis, kaj Joĉjo rakontis pri sia feliĉo kaj siaj profitaj intersaĝoj. La knabo diris, ke li portas la anseron al baptofesto. "Levu ĝin — daŭrigis li kaj prenis la anseron per laflugiloj — kiel peza ĝi estas, oni ĝin grasigis ok semajnojn. Kiu manĝos la restaĵon, al tiu la graso fluos sur la mentono." "Jes, — diris Joĉjo, pesante la birdon per la mano — ĝi estas peza, sed mia porko estas ankaŭ bela ekzemplero."

Dume la junulo ĉirkaŭrigardis suspekto, balancis la kapon kaj fine diris: "Aŭskultu, ne tute klara estas la afero kun via porko. En la kamparo, tra kiu mi ĵus pasis, oni ŝtelis porkon al la estro. Mi timas, ke ĝi estas nun en via veturilo. Homoj diskuris serĉi la ŝtelinton. Kia skandalo, se ili trovos vin kun la porko: malluma kavo atendas vin." Ektimis la bona Joĉjo. "Ho Dio — diris li — savu min, amiko; vi konas la ĉirkaŭaĵon, prenu mian

Jus aperis 3-a eldono de

BES-a ADRESARO DE ESPERANTISTOJ

el ĉiuj landoj.

Bela, praktika manlibreto, 90-pĝa, kun 1000 adresoj kaj ilustraĵoj. Prezo 1ŝ. 6p., alilande 1.50 Fr. sv., pagebla en poŝtm. aŭ respondk.

Aliĝu tuj al 4-a eldono! Enskriba kotizo, 1/-, kun adresaro 1ŝ. 6p., kun propra portreto 3ŝ. 3p.

Anoncu en 4-a eldono! 1 pĝ. 7ŝ. 4p. (8 Fr. sv.), 1 linio, 1/-.

Eldonas "Bohema Esperanto-Servo," Moravany, Bohemujo, Ĉeĥoslovakujo.

Reprezentanto por Aŭstralio: A. R. COHEN, "The Hawthorns," Malvern Rd., East Malvern, Vic., peras vendon, aliĝojn kaj anoncojn.

porkon kaj lasu al mi vian anseron.”
 “Mi iom riskas — respondis la junulo — sed mi ne volas esti kulpaj pri via malfeliĉo.” Li prenis la ŝnuron en la manon kaj ekpelis rapide la porkon sur flankan vojeton; la bona Joĉjo trankviliginte iris hejmen kun la ansero sub la brako. “Bone pripensinte — diris li al si mem — mi vidas, ke mi gajnis per la intersaĝo: unue mi havas la bonan rostaĵon, poste multon da graso, kiu elgutos kaj sufiĉos por pano dum kvaronjaro, fine ĉi belajn blankajn plumojn, per kiuj mi remburas kusenon. Komforta estos la dormado! Kiel ĝojos la patrino.”

Li pasis la lastan kamparon. Tie li renkontis akrigiston, kiu kantis turnante sian ilon:

Akrigas bonege mi ĉiun tranĉilon.

Rapide, rapide mi turnas la ilon!

Joĉjo haltis kaj rigardis la laboron; fine li ekparolis: “Gaje vi laboras, profita do estas via metio?” — “Jes, ĝi donas orajn enspezojn. Bona akrigisto, ĉiufoje kiam li metas manon en la poŝon, trovas tie monon. Sed kie vi aĉetis la belan anseron?”

— “Mi ĝin ne aĉetis, mi ricevis ĝin intersaĝe por mia porko.” — “Kaj la porkon?” — “Mi prenis ĝin por bovino.” — “Kaj la bovinon?” —

— “Mi ricevis por ĉevalo.” — “Kaj la ĉevalon?” — “Por ĝi mi donis pecon da oro tiel grandan, kiel mia kapo.”

— “Kaj la oro?” — “Gi estis salajro por sepjara servado.” — “Por ĉio vi ĉiam trovis rimedon — diris la akrigisto — se ĉiu matene, kiam vi leviĝas, mono sonus en via poŝo, la feliĉo estos via.” — “Kiel tion fari?”

— diris Joĉjo. “Vi devas fariĝi akrigisto, kiel mi; oni nur bezonas por tio ŝtonan akrigilon, ĉio cetera troviĝos per si mem. Jen estas tia ilo, ĝi estas iom difektita, sed mi postulas por ĝi nur vian anseron! Ĉu vi konsentas?” — “Kiel vi povas demandi — respondis Joĉjo — mi ja estos la plej feliĉa homo sur la tero; se mi havos monon ĉiufoje, kiam mi metas manon en la poŝon, kion mi bezonos plu?” Li donis la anseron al la akrigisto kaj ricevis la akrigilon.

“Nun — diris la ruzulo kaj levis ordinaran ŝtonon, kuŝantan apud li — jen prenu ankaŭ ĉi tiun bonan ŝtonon, sur kiu vi povos bone forĝi, vi rektigos sur ĝi kurbajn najlojn. prenu ĝin kaj gardu bone.”

Joĉjo prenis la ŝtonojn kaj iris kun

ĝoja koro; liaj okuloj brilis de kontento. “Mi naskiĝis sub bona stelo — iris li — ĉio sukcesas al mi.” Li eksentis lacigon, ĉar li estis sur la piedoj de l’ frua mateno; ankaŭ li malsato turmentis lin, ĉar li komencis la tutan provizon de ĝojo, kiam li ricevis la bovinon por la ĉevalo. Fine li nur pene paŝis kaj ĉiumomente haltis. La ŝtonoj terure premegis lin. Li ne povis forpeli la penson, kiel bone estos, se li ne bezonus porti ilin. Kiel limako li alrampis al putro por ripoziti tie kaj sin refreŝigi per freŝa akvo. Li singarde metis al ŝtonojn sur la rando kaj kliniĝis al la akvo por trinki. Malatente li tuŝegis ilin kaj la ŝtonoj plaŭd plaŭd falis en la puton. Joĉjo vidinte tion eksaltis de ĝojo ekgeuis kaj kun larĝaj en la okulo dankis Dion por la favoro, per kiu li liberigis lin de la lasta ŝarĝo. Li ne bezonis riproĉi sin mem kaj ekris: “Tiel feliĉa homo, kiel mi, ne ekzistas sub la suno.” Kun libera koro kaj sen iu ŝarĝo li iris hejmen kaj venis al la patrino kun malplenaj manoj.

El Germana tradukis Kabe.

Fremdlandaj Eroj.

Esperanto is now a recognised subject of instruction in Bulgarian schools. The Minister of Public Instruction has appointed 29 official teachers, who will teach in the schools of 20 different towns.

S-ro Dimitr Kančev has given the freehold of a site in the centre of the town of Shumen on which to erect an Esperanto Home and School. He has also added 10,000 levos, (normally equal to £400), to start the building fund.

The eighth Japanese Congress was held in Tokio on 14th October and four following days. S-ro Ono reported that he and his friends at the Tokio Imperial University intended to publish their researches in Esperanto. S-ro Oiŝi, observatory director, reported that he used Esperanto officially.

Gazetoj Ricevitaj.

Amerika Esperantisto, n-ro 6; Arguso, n-ro 2; Bulgara Esperantisto, tria jaro, n-ro 1; Bizantio, n-ro 2; Espero Teozofia, Krakovska, n-ro 2; Praha II, dua jaro, n-ro 1; Es-

peranto Finnlanda, n-ro 8-9; La Esperantisto, n-ro 22-23; Franca Esperantisto, n-ro 9-10; Kataluna Esperantisto, n-ro 10; Katolika Mondo, n-ro 2; L'Esperanto, n-ro 9; Nova Tagiĝo, hektografita, n-ro 2; Oficiala Gazeto, n-ro 4 (81); Progreso, n-ro 8; Revuo Orienta, n-roj 8, 9; Sennacieca Revuo, (antaŭe "Esperantista Laboristo"), 177 Rue de Bagnolet, Paris, n-ro 1; Verda Ombro, n-ro 9.

Usona Ekspozicia S'ipo.

Usonaj fabrikistoj estas decidintaj sekvi la ekzemplon de kelkaj aliaj landoj sendante eksterlanden ŝipon por ekspozicii komercaĵojn fabrikitaĵojn en la Unuigitaj Statoj. La vapors'ipo, St. Louis, kiun oni nun pretigas en Nov-Jorko kiel naĝantan ekspoziciejon per ekzempleroj de la produktaĵoj de tri cent plej gravaj usonaj fabrikistoj, lasos Nov-Jorkon en januaro por fari tion, kion oni priskribas kiel usonan vendadinstigan vojaĝon al 50 alilandaj havenoj. La batalkrio de la entreprenado, "Mi diros al la mondo," flugos de la ŝipantaĵo. Se estus aldonitaj la vortoj, "Per Esperanto," ni tute aprobus la entreprenadon!

S-ro Robt. Kreuz, Hedderichstrasse 751, Frankfurt, (Main), sud. Germanujo, deziras korespondi kun samideanoj en Austral—Anglaj kolonioj kaj Filipinaj insuloj.

S-ro Cyril P. Mandel deziras korespondadi kun ĉiuj landoj. "Warrawing," Belgrave Stn., Vic., Aŭstralio.

Leonid Fregubenko, Ruslando. Briansk, Orlovskoj gub., Moskovskaja, N 103, deziras korespondadi pri ĉiu temo kaj interŝanĝi per p. m. kaj p. k. kun eksterlandanoj prefere kun Oceanianoj. Mi ĉiam al ĉiuj respondos.

Kvin junaj esperantistoj deziras korespondadi letere kaj p. k. il kun Aŭstraliaj kaj Nov-Zelandaĵ Esperantistinoj. Ĉiam kaj tuj respondos. S-ro G. Ulrich, s-ro Ivan Majstrovich, s-ro W. Klarich, s-ro Ivan M. Petričevich, s-ro B. A. Klaričič, ĉiuj ĉe G.P.O., Auckland, N.Z.

Tien Kaj Reen.

Trans la ondo, trans la bluo,
trans la movoplena maro,
al la lando nekonata
kuras nia ŝip' sen baro
foren, ho foren!

Ho, sopiro, enuado
pro la hejmo malproksime;
tagoj tiras sin limake,
sed la ŝip' sin turnas fine
reen, ho reen!

Trans la ondo, trans la bluo,
trans la ĝojoplena maro,
al la lando bonkonata
flugas nia ŝip' sen baro
hejmen, ho hejmen!

Jen la bajo, jen la kajo,
jen amikoj sur la bordo;
kri', salut', manpremo, kiso...
kantas ĉiu kora kordo:

"Hejme, jam hejme!"

A. Delsudo.

Returned Congressists.

Messrs. Pyke and Rawson, two Australians who attended the Prague Congress, have arrived home. A conversazione to welcome them will be held at Austral Salon, on Friday, 20th January, at 8 p.m.

Malgranda infano promenante kun la patro kaj lastmode vestita patrino ekprenis la pantalonon de la patro. "Ne prenu mian pantalonon," diris la patro; "prenu la jupon de la patrino." "Mi ne povas ĝin trafi," piendis la infano.

Laŭ iu specialisto, nuda gorgo estas la plej bona resanigilo por komenca malsano de la gorgo. Tial la civitanoj senharigitaj de enspeza imposto kaj aliaj turmentoj povas konsoli sin per la penso, ke nuda kapo estas eble la plej bona resanigilo por komenca frenezeco.

Peterburgo. Labalkanski 53, Michel Ambros, deziras korespondadi pri socialismo, amo, religio, laborista movado, lingvistiko kaj estonteco de homaro. Oni povas al mi skribi ruse, pole, angle, esperante, france kaj japane,

"The Esperanto Guide."

Translation of the Exercises.

Exercise 23.—Vidante la fraŭlinon, mi petis ŝin diri al mi, kie ŝi trovis la leteron, kiun ŝi tenas en sia mano. Se mi havus kelke da diamantoj kaj perloj, mi volonte donus ilin por aĉeti tiun palacon. Kion vi donos dote al via filino? Mi ne povas doni al ŝi monon; ŝia doto konsistas el unu bela domo, tute nova. Kiam vi edziĝos kun ĉi tiu sinjorino? Mi edziĝos post du aŭ tri monatoj. Pri mia frato mi povas diri, ke li ĝis (or: fariĝis) tiel fiera, tiel malagrabla kaj tiel obstina, ke neniu volas plu akcepti lin. Baldaŭ li havos ne eĉ unu amikon. Forkonduku lin al la palaco, kie oni zorgos lin. Jen la arestitoj atendantaj en angulo, demandantaj sin, ĉu ili baldaŭ estos juĝitaj, kaj ĉu ili estos punitaj. Trovinte nenium en la urbo, kiu volus akcepti min, mi trovis loĝejon en la vilaĝo. Rimarkinda; vizitinda; kaptinda; riproĉinda; senvalora; varmigi; sanktigi; pleniĝi; unuigi; mortigi; kaŝigi; sidigi; venigi.

Exercise 24.—Hodiaŭ ŝi diris al mi la veron, sed hieraŭ ŝi mensogis. Dum sia tuta vivo li laboris, neniam ripozante. Kiam vi parolis al mi pri tio, mi jam antaŭe skribis (or: mi estis skribinta) al la instruisto. Ĉu li antaŭe finis sian laboron? Mi ne scias, sed li diris, ke li foriros, kiam li estos ricevinta la monon. Mi tre dezirus, ke li estu alveninta antaŭ via foriro. Mia avino tre miras, ke vi ne povis respondi al ŝi pli frue. Se mi sciis tion, mi estus foririnta pli malfrue. Kiam vi estos rakontinta la aferon al li, li certe kredos vin. Se via filo parolus pli ĝentile, mi ne estus puninta lin. Estas necese, ke vi estu fininta ĉion morgaŭ. Nun vi ripozas, kiam vi devus esti fininta tiun laboron antaŭ la tria horo. Se li estus veninta, mi lin estus akceptinta kun plezuro.

Exercise 41.—Li estas honorinda homo. Kiam ĉi tiu memorinda aventuro okazis al vi? Ni devas esti pardonemaj al via proksimuloj. Tio, kion vi rakontas al mi estas nekredebla, kaj vi volas ke mi kreu ĝin! Ni laŭdu tion, kio estas laŭdinda, kaj ne ĉiam serĉu la erarojn de aliaj homoj. Mi eble povos haltigi lin, sed mi ne estas certa pri tio; li estas tre venĝema. Ni montros al vi ĉiujn vidindaĵojn de nia urbo. Tiu mirindaĵo okazis antaŭ dudek jaroj. Li estas iom dormema. Tiu pano estas tiel malmola, ke ĝi estas nemangebla. La frato de Johano estas tre servema, sed li estas ankaŭ tre ofendiĝema.

Exercise 42.—Disiru, sinjoroj; ni estas permesate stari antaŭ la urbodomo. Nia kunveno havis nenian rezultaton. Kvankam ni preparolis la aferon dum tri horoj, ni povis fari nenian decidon. Ni reskribis kunvenos proksiman vendredon. Kion Dio kunigis, la homo ne devas disigi. Ili estas nedisigeblaj amikoj. Dissendu leterojn al ĉiuj viaj amikoj. Redonu al mi la librojn, kiujn mi pruntis de mi lastan monaton, mi petas. Vere, vi rejniĝas. Mi esperas, ke vi resaniĝos tre rapide, tiel ke ni povu reiri al la montoj. La tute ne komprenis tion, kion mi diris al li; li devos refari sian laboron. Ĉu vi ne timas la trablovon en ĉi tiu ĉambro? Mi timas, ke vi remalvarmumos.

Al Niaj Subtenantoj.

Ni ricevis la jenajn sumojn, kun danko:—E. Ely, 4/6; F. J. Williams, 4/6; A. B. Cashmore, 1/-; J. Mader, 5/-; L. S. Payne, 5/-; C. Price, 5/-; N. Biagioni, 5/-; A. Hollow, 4/6; —Thompson, 4/6; S. M. Ujder, 5/-; B. A. Klariĉić, 4/6; A. Klein, 4/6; B. Tindall, 4/6; W. J. Drummond, 4/6; G. Sinclair, 4/6; W. Dalgleish, 4/6; P. Leahy, 5/6.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

Two Million Books and Pieces of Music.

Send for "The Rainbow," Cole's Monthly about Books.

Free to You.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association,
Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne, by
Fraser & Morphet, Printers, Eastbourne Street, Windsor.